Prezo: 6 €
www.satesperanto.org
Januaro-Februaro 2022 | n-ro 01-02 (1399-1400)

ESPERANTO S.A.T.

# Sennaciulo

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda




SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Perantoj

**Aŭstralio** – Franciska Toubale
1 Marne Road, Mount Evelyn, Victoria 3796, Aŭstralio
rete: fran14@bigpond.net.au
**Belgio** – Claude Glady
Rue du Culot, 1, BE-5630 CERFONTAINE
Tel-Fakso-Respondilo: 00-32- (0)71 644916
Rete: cglady@arcadis.be
Bankkonto: 750-6373051-18
IBAN: BE50 7506 3730 5118, BIC: AXABBE22
**Bosnio-Hercegovino** – Fetah Zvirac
Esada Pašalića 6
71000 Sarajevo
Bosna i Hercegovina
rete: fetahzvirac@gmail.com
tel. (poŝa): +387 (0)61 170 094
**Brazilo** – Fernando Pita,
Estrada Coronel Vieira, 134, Bl. 03 Ap. 402, Bairro Irajá
BR-21220-310 Rio de Janeiro
rete: magisterpita@gmail.com
tel: +55 21 98863-3854
**Britio** – Arturo Prent
7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex CM13 1EJ, Britio
tel.: +44.1 .277.22.89.62
Nomo: "SAT Sennacieca Asocio Tutmonda"
Bank-kodo: 09 01 56 / Kont-n-ro: 57604003
BIC: ABBYGB2LXXX
IBAN: GB62ABBY09015657604003
rete: ap_esp-sat21@yahoo.co.uk
**Bulgario** – Metodi Markov
Vasil Levski, 20; BG-2700 Blagoevgrad; Bulgario
tel. (fiksa): +359 73882791, (poŝa): +359 879040403
rete: mam1948@abv.bg
IBAN: BG98FINV915010BGN030E5; BIC: FINVBGSF
**Ĉinio** – Bruno Guy Claude Henry
rete: esperanto.bhenry@yahoo.fr
Bankkonto n-ro 6217857500009246684
SWIFT kodo/BIC: BKCHCNBJ970
Bank of China - Hunan Branch n-ro 593 1, Duan Furong Road (M) Changsha - Hunan - Ĉinio
**Francio** – Barthélémy Maurau
Appartement 120, 3 allée Nathalie SARRAUTE
FR-27000 EVREUX, Francio
rete: barthelemy.maurau@free.fr
**Germanio** – Gary Mickle
Brüsseler Str. 6, DE-13353 Berlin, Germanio
rete: gmickle@nexgo.de

**Hispanio** – Pedro María Sanz Sanz
Apartado 8042, ES-28080 Madrid
rete: pedrosanzsat@gmail.com
Konto: 0182-9465-65-0200272726 (BBVA)
IBAN: ES48 0182 9465 6502 0027 2726
BIC: BBVAESMM
**Hungario** – PETIK Janos (35623)
Hársfa u. 31. I/7
HU-3104 Salgótarján
retadreso: kitepsonaj@gmail.com
**Italio** – Nicola Ruggiero
Via Francesco Petrarca, 9
IT-10126 Torino (TO)
rete: nicolaruggiero1986@gmail.com
IBAN: IT05Z0347501605CC0011648125
SWIFT/BIC: INGBITD1
**Izraelio** – Jehoŝua Tilleman
97-A Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin, Izraelio
rete: b48705544@013.net
**Japanio** – Nakamura Daiŝin
Shinagawaku Yashio 5-6-39-1006, JP-140-0003 Tokyo
rete: sat-peranto-japana@googlegroups.com
Poŝtkonto: 00980-9-37624 SAT-Nihon
**Katalunlingvio** – Sandra Vives (KEA)
Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, Hispanio
tel.: +34 93 716 36 33, rete: sandra@esperanto.cat
**Koreio** – Jung Hyunsoo (Paz)
4014-2202, 156, Gwangyomaeul-ro, Yeongtong-gu
KR-16510 Suwon-si, Gyeonggi-do
rete: paze23@gmail.com
**Kroatio** – Ivica Ŝĉepanoviĉ (Truto)-poŝte
HR-21414 Gornji Humac (Otok Brac), Kroatio
Tel: +385.21.647.059, Poŝtel: +385.098.182.79.07
rete: ivica.scepanovic1@st.t-com.hr
Bankkonto: 3105505351 otpbanka
IBAN: HR51 2407 0003 1055 0535 1
BIC: OTPVHR2X
**Litovio** – Gražina Opulskienė
Obuoliuko 42, LT89213 Mažeikiai, Litovio
Tel.: +37068736457
rete: grazopul@yahoo.com
Bankkonto: LT347300010001720030
BIC/SWIFT: HABALT22, Swedbank
**Malagasio** – Justine (Lala) Ralalarisoa
Lot IIC - 72 - FD Manjakaray, MG-101
Antananarivo, Malagasio
rete: llrespr@libero.it
IBAN: MG46 0000 4000 0800 7694 2010 112
BIC: BMOIMGMG
**Norvegio** – Cécile Anda
Esperantoveien, LI, NO-4320 Hommersak, Norvegio
rete: cmranda@frisurf.no
**Portugalio** – PAZ Alexandra kaj PRIETO Roger
Joaquim Antonio de Aguiar 100, 1°
PT- 4000-309 PORTO
retadreso: alexandra.paz@gmail.com
retadreso: rogerprieto@gmail.com
Tel.: +351 916 793 285 / +351 915 067 954
Bankkonto: Caixa Geral de Depósitos
Konto: 0748007271900
IBAN: PT50003507480000727190049
BIC/SWIFT: CGDIPTPL

**Rusio** – Nikolao Gudskov
a/k 57, RU-105318 Moskvo, Rusio
rete: nikolao@yandex.ru
**Serbio** – Miomirka Kovačević
Španskih Boraca 32/2, RS-11070 Novi Beograd, Serbio
rete: miomirka.kovacevic@gmail.com
IBAN: RS35160003020011349313
SWIFT/BIC: DBDBRSBG
**Svedio** – Inga Johanson
Stampgatan 60B-1202, SE-411 01 Gotenburgo, Svedio
rete: ishim@hotmail.com aŭ ingajohansson50@gmail.com
Poŝtkonto: Svenska arbetaresperantoförbundet, n-ro 5 31 60-8
IBAN: SE75 9500 0099 6026 0053 1608
BIC: NDEASESS
**Svisio** – Dieter Rooke,
Interlakenstr. 122A, CH-3705 Faulensee.
rete: dieter.rooke@vtxmail.ch
tel:+41 62 396 01 86
**Ukrainio** – Andreo JANKOVSKIJ
str. Lajosha Havro 11-B, ap. 68, UA-04211 KIJV, Ukrainio
rete: andreoespero@gmail.com
telefone: 380 67 99 470 03
**Usono** – Brandon SOWERS
PO Box 52731
GA-30355 Atlanta
rete: bsowers@protonmail.com
**Ĉiuj landoj** – SAT-Sidejo
67 av. Gambetta, FR - 75020 Paris, Francio
rete (ĝenerala retadreso): kontakto@satesperanto.org
rete (pri financaĵoj): financoj@satesperanto.org
Tel.: (+33) 09 53 50 99 58
Poŝtkonto: 1234 22 K, La Banque Postale, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

## Kotizoj 2022

| Lando | Jarkotizo | Lando | Jarkotizo |
|---|---|---|---|
| Argentino | 8 € | Kongo, DR | 4 € |
| Aŭstralio | 48 € | Koreio | 36 € |
| Aŭstrio | 48 € | Kroatio | 16 € |
| Barato | 4 € | Kubo | 4 € |
| Belgio | 48 € | Latvio | 12 € |
| Bosnio-Herc. | 8 € | Litovio | 12 € |
| Brazilo | 16 € | Luksemburgio | 48 € |
| Britio | 48 € | Madagaskaro | 4 € |
| Bulgario | 8 € | Makedonio | 8 € |
| Ĉeĥio | 24 € | Malio | 4 € |
| Ĉinio | 8 € | Meksiko | 12 € |
| Danio | 48 € | Mongolio | 4 € |
| Estonio | 16 € | Nederlando | 48 € |
| Finnlando | 48 € | Nepalo | 4 € |
| Francio | 48 € | Norvegio | 48 € |
| Germanio | 48 € | Pollando | 16 € |
| Grekio | 8 € | Portugalio | 24 € |
| Haitio | 4 € | Rumanio | 12 € |
| Hispanio | 36 € | Rusio | 12 € |
| Hungario | 16 € | Serbio | 8 € |
| Irano | 8 € | Slovakio | 16 € |
| Irlando | 48 € | Slovenio | 16 € |
| Islando | 36 € | Svedio | 48 € |
| Israelo | 36 € | Svisio | 48 € |
| Italio | 44 € | Tajvano | 32 € |
| Japanio | 48 € | Turkio | 12 € |
| Kanado | 48 € | Ukrainio | 4 € |
| Kolombio | 8 € | Usono | 48 € |
| Kostariko | 12 € | | |

**DUMVIVA MEMBRECO: 1 300 €**

Por **Francio**, **Germanio**, **Hungario** kaj **Norvegio**, pagu al la SAT-konto en Parizo (vidu detalojn en "**Ĉiuj landoj**") sed nepre informu la peranton kaj la SAT-kasiston pri via pago.

> Por la nemenciitaj landoj la ĉi-jara baza kotizo al SAT estas 4 €. La PK indikos la prezon de la postaj jarkotizoj.
> **Nura abono al *Sennaciulo*: 75% de la kotizprezo en la koncerna lando.** Pagante ĉi sumon, nemembro povas jaraboni *Sennaciulon* + ĝian jaran suplementon *Sennacieca Revuo*.
> Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas, perrete kaj surpapere, *Sennaciulon* + ĝian jaran suplementon *Sennacieca Revuo*.
> Help- kaj grup-membroj pagas minimume duoblon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
> Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25-jaraj) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo, kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
> Samfamiliano de membro pagas la duonon de la jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekzemple dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.


*Sennaciulo*
Organe officiel de SAT / Oficiala organo de SAT

**Siège de SAT / Asocia sidejo de SAT**
67 avenue Gambetta,
FR-75020 Paris, Francio
*Retadreso:* kontakto@satesperanto.org
*Retejo:* http://satesperanto.org
*Tel.:* (+33) 09 53 50 99 58
*Poŝtkonto:*
1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

**Plenum-Komitato de SAT**
*Prezidanto:* Vinko Markovo
*Vic-prezidanto:* Pedro Sanz
*Sekretario:* Brandon Sowers
*Kasisto:* Bruno Henry
*Vic-kasisto:* Alexandra Paz
*Ceteraj membroj:* Saioa Escobar, Paz (Jung Hyunsoo), Dominiko Simeone
*Reprezantoj de SAT en la LEA-Komitato:* Saioa Escobar, Paz

**Sennaciulo**
*Redaktoskipa kunordiganto:* Vinko Markovo
*Vic-kunordiganto:* Pedro Sanz
*Enpaĝiganto:* Nicolas Raymond
*Ceteraj redaktantoj:* José Antonio del Barrio, Gary Mickle, Rob Moerbeek, Grazina Opulskiene, Marcel Redoulez, José María Salguero (Kani), Richard Schneller kaj Franciska Toubale
*Kontribuojn sendu elektronike al:*
sennaciulo.redaktejo@gmail.com
*aŭ paperpoŝte al*:
SAT-Amikaro
132-134 boulevard Vincent Auriol
FR-75013 Paris, Francio
*Pri financaj aferoj sendu al:*
financoj@satesperanto.org
*Libromendojn sendu al:*
libroservo@sat-amikaro.org
*Librajn eldonproponojn sendu al:*
pimskrabo@yahoo.fr
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.
Imprimé par/*Presita de:*
Ulzama, Pol. Ind. Areta, calle A-33, ES-31620 Huarte (Navarra)
Aperas dumonate - Bimestriel.
Abonnement annuel/*jara abono:*
France 36 €
Autres pays/*aliaj landoj:* petu la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.
Dépot légal à la date de parution:
N° CPPAP 05 25 G 86567

# ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Kiam tiu ĉi numero atingos vin elektronike, vi normale estos ricevintaj la presitajn versiojn de la numeroj 5-6 kaj 7-8 de la jaro 2021. La numero 9-10 kaj *Sennacieca Revuo* estas nun presataj. La nova produktad-proceduro ankoraŭ bezonas poluradon, sed la situacio ŝajnas survoje al reordiĝo, kvankam ni bezonos certe plurajn monatojn por retrovi normalan aperritmon.

Intertempe trafis nin plia malfacilaĵo. Dum la diverstipaj limigoj ligitaj al la pandemio iom post iom malkreskas, eksplodis milito inter Rusio kaj Ukrainio, pri kiu vi povas legi komunan deklaron de la Plenumkomitato kaj de la Organiza Kongres-Komitato en Moskvo. Por la tria fojo, SAT do devos kongresi rete, inter la 29a de julio kaj 1a de aŭgusto. Ne hezitu jam pripensi vian kontribuon kaj aliĝu ĉe la jena paĝo https://satesperanto.org/spip.php?article4987 !

Pri la enhavo de tiu ĉi Sennaciulo, unu el la artikoloj denove levis diskuton pri redaktopolitiko ene de la redaktoskipo, dum kiuj montriĝis, ke ne ĉiuj havas saman koncepton pri esprimlibereco. Tiu diverseco de vidpunktoj spegulas tiun ene de la membraro, laŭ la lasta opinisondo (vidu *Sennaciulon* de januaro-februaro 2018, paĝo 24). La estonteco diros, ĉu ni sukcesos konservi ian ekvilibron tiurilate. Kiel kutime tio dependos unuavice de la materialo kaj de la laborfortoj, kiujn vi ĉiuj disponigos al la redaktejo.

Agrablan legadon deziras al vi

La redaktoskipo

**Frontpaĝa bildo:**
Strata pentraĵo kun ĝia aŭtoro Shev Lunatic (www.shev-lunatic.com), fotita en la tago kiam ĝi estis pretigita sur muro en Parizo. Ironie inspirita de Ilja Repin.

# Enhavo


**Tra la mondo : Milito en Ukrainio**

4 Komuna Deklaro de SAT Plenum-Komitato kaj la Organiza Komitato por la 95a SAT-kongreso, kiu devintus okazi ĉi-jare en Moskvo

4 La teritoria integreco de ŝtatoj kontraŭ la memdetermino de popoloj

**Tra la mondo : Eŭropo**

5 11 tezoj Pri organizoj kaj revolucia praktiko por fundamenta reorientado de maldekstre-radikala politiko

**Tra la mondo : Azio**

8 Koncerto de la Naŭa Simfonio de Beethoven en la pandemio

**Tra la mondo: Afriko**

12 Literaturaj premioj por afrikanoj

**Medio**

15 Panika pandemio

**Historio**

16 Kontinenta revolucio

**El la SAT-administrejo**

18 Donacintoj

**Opinioj**

19 Esperantuloj kaj SAT fronte al la klimatkatastrofo

20 La ĉefepiskopo kiu defias la Papon

27 Onta Ĉefpatro

**El la SAT-administrejo**

27 Novaj aliĝoj

**Opinioj**

28 En la socio la Conatus estas plago !

**Beletro**

29 Verdaj bomboj kontraŭ grizaj katakomboj

31 Hispana somero

**SAT-anoj aktivas**

33 Esperanto-babiladoj en Barcelono

**Nekrologoj**

34 Claude Nourmont (32884)

35 Veerle Paesbrugge, anarkiisma esperantisto (1969-2021)

**Tra Esperantio**

36 Mesaĝo de UEA okaze de la Tago de Holokaŭsta Memoro, 27 januaro 2022)



Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:
**sennaciulo.redaktejo@gmail.com**

# Komuna Deklaro de SAT Plenum-Komitato kaj la Organiza Komitato por la 95a SAT-kongreso, kiu devintus okazi ĉi-jare en Moskvo

La Organiza Kongresa Komitato por la 95-a Kongreso de SAT, kune kun la Plenum-Komitato de SAT, konstatas, ke pro la morala kaj praktika maleblo okazigi kongreson de SAT en militanta lando, la kongreso ĉi-jare ne povos okazi ĉeeste.

Ni kondamnas la teruran agreson de la nuntempa registaro en Rusio kontraŭ la ukraina popolo. Ni subtenas la kontraŭmilitan movadon en Rusio, kaj esperantistojn, laboristojn, studentojn kaj popolojn en la mondo, kiuj helpas civilulojn en Ukrainio. Diplomatio tutmonde devas agadi por ĉesigi la militon kaj ne akceligi konfliktojn. Ne al milito. Jes al paco!

Dum la sekva periodo ni provos trakti diversajn manierojn krei alternativojn al la ĉeesta kongreso planita por Moskvo. Ni esperas okazigi aranĝojn, verŝajne virtualajn, kiuj ebligos esperantistojn interkompreniĝi kaj diskuti pri diversaj pacmovadoj, sociaj reagoj kontraŭ milito, kaj simile. Ni ankaŭ provos serĉi manieron okazigi kongreson iamaniere, eĉ se virtuala, kaj intencas fokusigi ĝin pri pacmovadoj. Ni bonvenigos proponojn de SAT-membroj kaj aliaj esperantistoj pri tiaj temoj.

Plenumkomitato - Sennacieca Asocio Tutmonda

*Organiza Kongresa Komitato - 95a Kongreso de SAT*




# La teritoria integreco de ŝtatoj kontraŭ la memdetermino de popoloj

Du ofte citataj principoj, ambaŭ kun establitaj radikoj en la internacia juro, ofte konfliktas – la teritoria integreco de ŝtatoj kaj la memdetermino de popoloj.

Tiu ĉi ripetiĝanta kaj neevitebla konflikto evidentas en la diplomatia agnosko de la du separatismaj, plimulte rusaj respublikoj de Donbaso, en kiuj, kiel en la ekssovetiaj regionoj Abĥazio, Suda Osetio kaj Krimeo, de kiuj Rusio agnoskas ĉiujn kiel sendependajn ŝtatojn (en la kazo de Krimeo antaŭ ĝia reintegro en la Rusian Federacion), same kiel en Kosovo, la plej multaj homoj klare deziris apartiĝi de la lando, al kiu oni internacie agnoskis ilin apartenaj.

Neniu devus miri, ke la principo, kiun iu ajn registaro proklamas absoluta – aŭ almenaŭ precedenca kaj superrega – en iu ajn aparta kazo, estas la principo akordanta kun la rezulto, kiun ĝi preferas en la konkreta kazo.

Okcidentaj ŝtatoj, kiuj nuntempe trumpetas la absolutan kaj universalan

aplikeblon de la principo de teritoria integreco de ŝtatoj, havis neniun problemon apogi la memdeterminon de popoloj en Eritreo, Orienta Timoro, Suda Sudano kaj, kun peza helpanta mano per 77-taga NATO-bombado en flamanta atenco kontraŭ la internacia juro, en Kosovo.

La plej magra plimulto el la membroŝtatoj de UNO (97 el 193) aktuale donas diplomatian agnoskon al Kosovo. Decidoj tiurilataj neeviteble influiĝas de precedencoj proksimaj al la propra hejmo. El la kvin EU-membroŝtatoj, kiuj ne agnoskas Kosovon, du, Kipro kaj Hispanio, havas zorgojn pri separatismaj movadoj en siaj propraj teritorioj, dum Grekio detenas sin de agnosko pro solidareco kun grekaj kipranoj.

Estas ankaŭ logike, ke Ĉinio, malgraŭ sia rilato "pli forta ol alianco" kun Rusio, ĵus rekonfirmis sian profundan ligiĝon al la principo de teritoria integreco de ŝtatoj. Ĉinio akute zorgas pro separatismaj sentoj en Honkongo, Tajvano kaj Ŝinĝjango.

Elstaran ekzemplon de ekstrema fleksebleco en aplikado de tiuj du "principoj" donas Kosovo mem. Ĉe sinapogo kaj eluzo de la principo de memdetermino de popoloj (kaj NATO-bomboj) por atingi sian efektivan sendependecon, tiu plimulte albana angulo de Serbio (kiu, je reeĥo de la "Kieva Regno", vidis Kosovon kiel la batantan koron de la serbaj historio kaj kulturo) ekde tiu momento rifuzis pripensi la reintegriĝon en Serbion de la norda angulo de la lando kun superpeza serba plimulto, kies popolo kompreneble ne volas havi ion komunan kun Kosovo. Kiel laŭŝajna antaŭmalhelpa bato kontraŭ racia solvo de tiu ĉi disputo, la kosova registaro eĉ, unike, metis la mapon de sia postsendependeca teritorio sur sian flagon.

Fine, la statuso de la usona registaro, aljuĝinta kiel la unua en la mondo al Israelo suverenecon super la okupaciita Orienta Jerusalemo kaj la okupaciitaj siriaj Golanaj altaĵoj, kaj kiu aljuĝis al Maroko suverenecon super la okupaciita Araba Demokratia Sahara Respubliko (Okcidenta Saharo) – en ĉiuj tri kazoj kontraŭ la deziroj de la tuta okupaciita popolo – klare evidentigas, ke la sola principo, al kiu la usona registaro konsekvence ligas sin en tiaj aferoj, estas la fundamenta principo de la nuntempaj internaciaj rilatoj: ne la naturo de la ago gravas, sed anstataŭe, kiu faras ĝin al kiu.

La plej multaj registaroj, precipe la potencaj, elektas siajn "principojn" el menuo de opcioj laŭ sia plej aktuale preferata gusto.

John Whitbeck [elangligita de G. Mickle]

[John V. Whitbeck estas internacia juristo bazita en Parizo. Ĉi tiu artikolo aperis ĉe *Counterpunch* la 22-an de februaro 2022:
https://www.counterpunch.org/2022/02/24/the-territorial-integrity-of-states-vs-the-self-determination-of-peoples/ ]



# 11 tezoj

## Pri organizoj kaj revolucia praktiko por fundamenta reorientado de maldekstre-radikala politiko

**Sube vi trovos la 11 temojn de la grupo *Kollektiv!*, grupo kiu formiĝis en la printempo de 2016 en Bremeno (Germanio). Kun ĉi tiu teksto (kaj la praktika projekto, kiun ili ligis al ĝi), ĉi tiu grupo provas fari aktivan kontribuon al la provo tiri la maldekstran-radikalan movadon el la malfeliĉo, kie ĝi estas nuntempe en multaj lokoj de Eŭropo (kaj pli tie).**

**La teksto estis origine eldonita en la germana kaj nun estis tradukita al la angla, turka, persa, nederlanda, franca kaj nun ankaŭ al Esperanto.**

**Ni komencos per la enkonduko, kiu donas plian klarigon pri la venontaj tezoj kaj la kialon por verki la 11 tezojn.**

**Ni publikigos ĉi tiujn tezojn en semajnaj epizodoj.**

## Enkonduko

Tamen, krom silenta senpoveco – kaŭzita de la ĉiam pli akraj atakoj de la kapitalisma sistemo kaj la manka potenco de la maldekstraj movadoj – en la lastaj jaroj ni ankaŭ

observis esperigan, novan, serĉantan movadon inter maldekstraj radikaluloj. La demando pri vera alternativo al kapitalismo estas diskutata pli forte, aŭ almenaŭ la diskuto pri ĉi tio pli kaj pli gravas. Krome, ankaŭ la demando estas, pri kiu konkretaj rimedoj kaj metodoj eblas realigi efektivan revolucion de la kapitalisma sistemo. Sendepende de kie ni venas, ĉi tiuj serĉoj respeguliĝas en la multnombraj diskutoj, kiujn ni havas kun kamaradoj kaj speguliĝas en la multnombraj strategiaj deklaroj publikigitaj en la lastaj jaroj. En ĉi tiuj diskutoj kaj publikigitaj artikoloj ni vidas kritikon pri nia aktuala politiko, kaj ankaŭ serĉadon de novaj strategioj.




Ni vidas la dek unu tezojn prezentitajn ĉi tie kiel kontribuon al ĉi tiu diskuto kaj kiel serĉon de nova strukturo de maldekstre radikala politiko. Ni estas (ĝis nun) malgranda grupo de homoj, kiuj devenas de diversaj ideologiaj tradicioj (marksistoj, marksistoj-leninistoj, aŭtonomaj, anarkiismaj kaj liberec-komunismaj) kaj geografiaj fonoj (Germanio, Turkio, Irano, Kurdio). Ni renkontis unu la alian en la multaj agoj kaj konsultoj de diversaj maldekstraj platformoj kaj ni ĉiam pli diskutis kiel socia ŝanĝo povus aspekti en la hodiaŭa socio kaj kiaj konkretaj paŝoj necesas por tio. Ni dividis nian malkontenton pri nia nuna politiko kaj la malsukcesaj perspektivoj de ni kiel maldekstraj radikaluloj – homoj kaj sen kaj kun migrada fono. El tiuj komence neformalaj konversacioj, pli permanenta partnereco nun aperis. Krom niaj propraj spertoj, ni ankaŭ kune legis kaj diskutis iujn el la eldonitaj strategiaj artikoloj kaj analizojn de aliaj grupoj.

La sekvaj tezoj aperis el niaj diskutoj. Ni provis esprimi per tio nian kritikon pri nia nuna politiko, tio estas, la politiko de grandaj partoj de la maldekstraj radikaluloj loĝantaj en la Federacia Respubliko Germanio. Ili ankaŭ enhavas ideojn pri kiuj konkretaj ŝanĝoj en nia praktiko ni vidas necesaj. Kvankam la analizo de la hodiaŭa socio estis grava parto de nia diskuto kaj de la respondoj, kiuj rezultiĝis el ĝi, dum formulado de la tezoj ni pli koncentriĝis al la demando, kiaj konkludoj por konkreta ŝanĝo en nia propra praktiko ni povas tiri el ĝi. Ĉi tio estas ĉar ni sentas, ke ĉi tiu paŝo ricevis tro malmulte da atento en plej multaj eldonitaj strategiaj artikoloj.

Ni ne vidas la tezojn kiel finan konkludon, sed kiel resumon de la diskuto(j). Demandoj aperis pli frue ol ili estis responditaj. Kun ĉi tiu publikaĵo, ni volas aliĝi al la nuna debato kaj interŝanĝi ideojn kun iu ajn, kiu nuntempe diskutas similajn aferojn. Kompreneble ni bonvenigas reagojn, kritikojn, aldonojn kaj pliajn kontribuojn al ĉi tiu diskuto aŭ kun invitoj al diskutaj kunvenoj, ktp. Ĉiuokaze ni estas malfermaj inviti homojn al plia interŝanĝo por plue intensigi la diskuton pri organizado kaj revolucia praktiko en Germanio (kaj ekster). Nia celo estas tiamaniere komenci veran organizan procezon.

## Revolucia politiko

Ni konstatas, ke revolucia praktiko ne povas esti simple enkondukita al la masoj en nerevoluciaj tempoj. Ni tamen kredas, ke la realeco de la hodiaŭa revolucia politiko ne kongruas kun la potencialo en la socio. Ĉi tio havas ion kun la maniero kiel organizita maldekstra radikala politiko ĝis nun. Ni eble ne atendas rektan revolucian disvolviĝon, sed ni povas fari multe pli por plue disvolvi ĉi tiun potencialon kaj prepari pli bone (por la tempo, kiam tio eblas). Ĉi tio estus logika respondo, konsiderante ke pli kaj pli multaj homoj okupiĝas pri dekstraj popolismaj kaj rasismaj ideologioj, kun la aŭtoritata kaj militarisma transformo de la socio alprenanta novan dimension – io eĉ eble pro la manko de maldekstre-radikala respondo al nuntempaj problemoj.

Tamen, kontraŭ la fono de la rasismaj kaj naciismaj mobilizadoj kaj la fiasko de pli larĝaj sociaj movadoj en Germanio, vaste subtenata respondo de maldekstraj radikaluloj estas ĝuste la malo. Kredo pri la ebleco de vera revolucia ŝanĝo estas malakceptata kiel naiva aŭ kiel iluzio, kaj socio estas etikedita reakcia kaj neŝanĝebla. Ĉi tiu aspekto kaj kritiko pri ĝi troveblas en la unua tezo. Revolucia politiko signifas (re)koni la

potencialon de socio. Centra por tio estas, ke la malsukceso de organizado de maldekstraj radikaluloj estas kaŭzita de ilia manko de strategio kaj efikeco. Necesas diri, ke la dua tezo bazas la socian forton, kiu estas centra en la organizo. En la sekvaj tezoj, ni provas plu esplori iujn fundamentojn por ebla organizo de maldekstraj radikaluloj kaj revolucia praktiko.

Pro la konsisto de nia grupo kaj nia komuna analizo, Internaciismo ludas gravan rolon por ni kiel strategia gvidilo (tria tezo). Tio validas por la organiza procezo mem, kaj ankaŭ por la strategia strukturo de nia politika praktiko. En la kvara tezo, ni provas plu konkretigi la praktikon, kiun ni konsideras grava. En la kvina tezo Engaĝanta vivon, ni pli detale rigardos la demandon ĝis kia grado ni opinias, ke sencas la konstruado kaj plivastigo de maldekstraj radikalaj projektoj, kiel strategio por socia ŝanĝo. La kritiko al la ofte subkultura, memcentra kaj identeca organizo de maldekstrema politiko ne multe ŝanĝiĝis, malgraŭ la fakto, ke ĉi tiu kritiko jam ofte estis esprimita en la lastaj jardekoj.

Pri tio ni diskutos plu en la sesa tezo La Subkulturo. Poste niaj pensoj sekvas la demandon de revolucia sinteno al la vivo en la sepa tezo Revolucia kulturo anstataŭ novliberalaj valoroj pri disvolvo de revolucia kulturo en maldekstraj radikalaj strukturoj.

Kun la malkresko de la maldekstraj movadoj en la 1990-aj jaroj, la serĉado de realaj alternativoj al kapitalismo ankaŭ fadis en la fonon en granda parto de la maldekstra radikala movado. En nia oka tezo Alpropriigo kaj disvastigado de Alternativoj, ni klarigas kial ni vidas la diskuton serĉi eblajn alternativajn formojn kaj modelojn de socio kiel centra elemento de maldekstra radikala politiko. Kaj serĉante alternativajn sociajn modelojn kaj celante nian strategion kaj praktikon, la diskuto pri revoluciaj teorioj ludas grandan rolon por ni. Tamen ekzistas la tendenco (kiu estas ankaŭ pli forta hodiaŭ) fokusiĝi ekskluzive sur lozaj, fermitaj teoriaj strukturoj, rezulte de kiuj la tranĉa militado de la pasinteco ripetiĝas, sen ia ajn grava rilato.

En la naŭa tezo ni do traktas Trakti teorion kaj revoluciajn tradiciojn. Fine ni venas al la deka tezo pri la signifo de edukado kiel integra parto de organizita maldekstra radikala movado. Ni ankaŭ vidas ĉi tion kiel longtempan projekton. Ni pensas konstrui alternativan sistemon de edukado, ekzemple en formo de "akademio de sube supren". Kvankam la kritiko esprimita en niaj tezoj kaj la bezono priskribita por fundamenta ŝanĝo de la maldekstra radikala orientiĝo ne estas novaj, bedaŭrinde malmulte ŝanĝiĝis ĝis nun en nia politiko. Tial en la dekunua kaj fina tezo necesas paŭzo kun niaj aktualaj kutimoj, ankoraŭfoje la centra demando estas kiel ni povas certigi, ke la kritikoj, strategiaj deklaroj kaj diskutoj, kiujn ni faras, ne nur estas paperaj butikoj, sed ankaŭ havas realan efikon en nia praktiko.

Antaŭ ol la tezoj komenciĝos, ni ankaŭ faru ĉi tie mallongan noton pri la signifo de diversaj formoj de subpremo. Ĉi tio estas necesa por ni, ĉar ni ofte parolas en la tezo pri "lukto kontraŭ kapitalismo" aŭ "reganta kapitalisma sistemo" sen mencii eksplicite la aliajn formojn de subpremo en nia socio. La fakto, ke ni ne (sufiĉe) traktas la specifajn demandojn de la batalo kontraŭ patriarkeco aŭ rasismaj strukturoj en ĉi tiuj dek unu tezoj, ne signifas, ke ni ne vidas la bezonon de ili aŭ konsideras ilin subuloj.

Male; ni kredas, ke la socio en sia aro ne nur estas ligita al kapitalaj rilatoj. Ni ne pensas, ke kun la renverso de la kapitalaj rilatoj, subite ĉiuj aliaj formoj de subpremo ĉesos ekzisti. Estas preskaŭ nenecese montri, ke patriarkeco kaj rasismo (kiel multaj aliaj formoj de subpremo) ekzistis antaŭ ol kapitalismo disvolviĝis. Samtempe ni estas nuntempe en historia fazo de kapitalismo, kiu, kiel la reganta organiza principo de la socio, ligas, interkovras, fortigas, distordas kaj kelkfoje eĉ malpliigas ĉiujn aliajn formojn de subpremo.

Por tio, ĉi tiuj (ofte apartaj) luktoj kontraŭ la diversaj subpremaj rilatoj ene de la kapitalisma sistemo nur videblas kaj estas kiel komuna lukto. La historio montras al ni, ke estas multaj ekzemploj, en kiuj disigi ĉi tiujn malsamajn luktojn estas kondamnita malsukcesi. Tiel la batalo kontraŭ patriarkeco, sen kontraŭkapitalismaj perspektivoj, estas englutita de la sistemo kaj finiĝas en nenio. Aliflanke, multaj revoluciaj movadoj en la pasinteco vidis, ke virinoj, sendepende de sia partopreno en la revolucio, estis forpelitaj reen al la kuirejo fine de la revolucio.

La renverso de la patriarka sistemo, same kiel de la rasismaj strukturoj kaj aliaj formoj de subpremado, devas okazi de la komenco de nia lukto kaj ĉiam tema ene de niaj propraj strukturoj. Precipe en la tradiciaj maldekstraj grupoj estas inklino alproksimiĝi al la revolucio nur el ekonomia perspektivo. Tamen kiam ni parolas pri kapitalismo, ni celas ne nur la ekonomian flankon, sed ankaŭ ĉiujn aliajn facojn de ekspluatado kaj subpremado en la hodiaŭa socio. Ni tial vidas revolucion kiel kontinuan kaj progreseman procezon por renversi ĉiujn ekspluatajn kaj subpremajn mekanismojn.

GRUPO *KOLLEKTIV!*
*Tradukis: Veerle Paesbrugge*

Vidu nekrologon en p. 35